

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Informoj pri Brno - Legendoj

Brunna rado

Miroslav Hruška

Tie malsupre en Lednice, ne fore ĉe austriaj limoj, vivis dum la tridekjara milito majstro de ordeno de ĉarfaristoj. Li nomiĝis Jiří Birk. Unufoje post tuttaga laboro li iris en gastejon havi vinon. Poste iris tien unu najbaro, poste dua, poste sekva, preskaŭ ĉiu estis metiistoj. Krom li estis tie dekdu homoj. La gastejmastro havis multe da laboro. Ĉiu parolis pri sia metio.

„En nia metio,“ parolis forĝisto, „ĉio devas iri bato post bato, ĝis estas fero arda. En nia metio estas tre necese havi tiom multe da lerteco.“

Tio ne plaĉis al Birk (li jam havis en si iomete de vino) kaj kriis:

„Vi, forĝistoj devas havi fajron en ardo, sed ni male en ni mem, ĉi tie por bona laboro. Ĉu vi scias, kion? Pri kio vi vetas, najbaroj, ke mi faros radon al veturilo dum dudek horoj kaj ankoraŭ tion rulos en Brunnon, antaŭ ol ili tie fermos la urbajn prodegojn?“

Inter la najbaroj oni murmuris kaj ekridetis.

„Vi eble faros la radon, tion ni scias bone, ke vi komprenas vian metion. Sed, ĉu vi scias, kiel longa vojaĝo estas al Brunno?“

„Kiel mi ne scius? Ses mejloj!“ rebatis lin Birk.

„Tiel li vidas! Kiel vi pruvus tion?“

„Tio estas jam mia problemo! Bone aŭskultu. Matene je la sesa horo, kiam la suno supreniĝos, mi faligos arbon, faros la radon kaj rulos al Brunno, ankoraŭ antaŭ ol la suno subiĝos.“

„Ne pensu, ke ni estas stultaj,“ diris unu najbaro.

„Do, tiel vetu kun mi!“ respondis ĉarfaristo. „Do, kio estas kun vi? Ĉu vi timas? Dekdu estas ni. Kiam mi ne sukcesos, mi pagos barelon de la plej bona vino, kian havas ĉi tie la gastejmastro. Sed, kiam mi sukcesos, ĉiu de vi donos al mi ĉi tie taleron. En ordo?“

„En ordo!“ ĉiu ekkriis! Ili jam ĝojis pri barelo da vino.

Matene iris Birk kun tri sekundantoj en arbaron. Li elektis belan grandan arbon kaj kiam la suno estis super la horizonto, li faligis la arbon kaj li komencis la laboron. Post mallonge li havis partojn de rado kaj poste kompletan radon! Li tre bone komprenis sian metion.

En tiu momento la suno estis jam tute supere kaj la ĉarfariŝto povis iri en Brunnon.

„Sed, memoru! Se la veto devas esti en ordo, vi devas doni al ni konfirmilon de la urbestro, kiel frue vi eniris Brunnon.“

Tio estis longega vojaĝo! Kiam ĉarfariŝto proksimiĝis al urbo, la kapo nur al li brulis kaj li ne povis anheli. Kiam li trakuris la judan pordegon kaj movis la radon tra Legoma placo supren al Petrov, oni jam sonorigis anĝeluson. Li tamen nur sukcesis! Li invadis en la magistraran salonon kaj rakonits, kiu kaj de kie li estas kaj kiel li vetis kun la najbaroj. En la momento la suno subiĝis. Oni pendigis la radon en la urbdoma pasejo kaj la rado pendas tie ĝis hodiaŭ. Kaj en la mezo estas bele skulptita nomo de majstro de Lednice (vi povas mem legi tion tie). Kiam Birk revenis hejmen, dekdu najbaroj jam atendis. Kaj ili kompreneble donis al li 12 talerojn. Kaj ili ankaŭ eltrinkis la baleron de vino. Sed, la venka veto ne estis feliĉa pro Birk. Oni parolis pri li, ke kara Birk havas ion kun diablo. Kiel li alie sukcesus? Unu post la alia komencis lin eviti, la majstro havis malpli da laboro, groŝoj malmultiĝis – malbona situatio. Li mortis en mizero – kaj tamen li tiam faris faman aferon!